

LAŬOKAZA NOVAĴLETERO

Organo de la
Internacia
Komerca kaj Ekonomia
Fakgrupo

[Provizora sidejo ĉe:]
Hornisgrinderstrasse 8,
7580 Bühl 16,
FR Germanio

Numero 16

Aprilo 1987



Estimataj gckolegoj!

Bedaŭrinde vi ricevis la Laŭokazan Novaĵleteron n-ro 15 de decembro 1986 ne meze de januaro kiel anoncite, sed pro teknikaj problemoj en Hungario nur komence de februaro. Mi pardonpetas vin pro tio, ankaŭ pro la ne malmultaj tajperaroj.

Perdinte tiom da tempo mi ne povis tuj redakti la februaran numeron, tiom pli, ke materialo mankis. Tial mi decidis ellasi ĉi-foje la februaran kaj prezenti LN n-ro 16 akurate en aprilo. Mi esperas, ke vi trovas ĝin pli belaspekta kaj senerara ol la antaŭa. Ĝojigis min kelkaj kuraĝigaj alskriboj.

Ĉi tiu 16 paĝa numero enhavas la jarraporton pri la agado kaj la finanĉan raporton kun spezkonto kaj bilanco por 1986. Mi varme rekomendas al vi la legadon de la du gravaj raportoj. Fine, bonvolu atenti la regularon pri aprobo de la jarraportoj kaj voĉdonado pri elekto de estraranoj. Ĉi-foje tiuj aprobo kaj voĉdonado ne okazos per Perpoŝta Referendumo sed en la Ĝenerala Konveno en Varsovio. Espereble la plimulto de niaj membroj povas ĉeesti la jubilean UK-on en Varsovio de la 25a de julio ĝis la 1a de aŭgusto 1987.

Cetero okazos du pliaj, ne-oficialaj IKEF-kunvenoj en ĉi tiu jaro: Kadre de la Germana Esperanto-Kongreso en Rastatt dum Pasko (17a - 21a de aprilo) kaj kadre de la Foiro pri Fiŝkaptado en Ancona/Italio (1a - 5a de junio 1987). Se estus eble por vi: VENU!

Franz Josef Braun

Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo

La Estraro:

S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝen. Sekretario

S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto

D-ro István Gether

S-ro Francois-Xavier Gilbert

S-ro Lawrence Mee

D-ro Marco Picasso

Revizoro por la financa raporto: D-ro Gianfranco Polerani

Centra sidejo (provizora):

Hornisgrindestr. 8

D-7580 Bühl 16 (FR Germanio)

Financa sidejo:

Visspaanstraat 97

B-8000 Brugge/Belgio

GRAVA ATENTIGO AL NIAJ MEMBROJ

1. La Estraro prezentas sian raporton por la jaro 1986 kaj proponas akcepton de tiu raporto.

2. La Estraro prezentas la financon raporton por la jaro 1986, notante, ke la ciferoj de la raporto estas prezentitaj en bona tempo al la kontrolo de la revizoro kaj proponas akcepton de tiu raporto.

3a. La Estraro notas la sumon de la financa deficito kaj proponas likvidon de tiu deficito per eluzo de parto de la kapitalo.

3b. Notante la sumon de la deficito, la Estraro tamen atentigas, ke adekvata kapitalo restas por efektiviĝi mastrumadon dum almenaŭ unu plena jaro sen ŝanĝo en la nivelo de membrokotizoj, kaj tial ne faras rekomendon pri plialtigo de la membrokotizoj.

4a. La estraranoj d-ro Gether, Gilbert kaj Mee elektitaj la 6an de aŭgusto 1985, baldaŭ estos du jaroj en sia ofico. Laŭ Statuto 7.1, dua frazo, estrarano tenas sian oficon por du jaroj. Do ilia estraraneco finiĝas ĉi-jare. Reelekto eblas. Ĉiu pretas denove esti elektota. En la nomo de la fakgrupo la aliaj estraranoj dankas ilin pro la laboroj faritaj dum la pasintaj du jaroj kaj proponas al la membraro ilian reelekton.

4b. Kiel nova Financa Konsilanto rolas ekde septembro 1976 s-ro Roland Rotsaert, Brugge/Belgio. Li devas esti aprobita per oficiala voĉdonado de la membraro. La estraro proponas la elekton de s-ro Rotsaert. Lia oficperiodo tiam daŭrus ĝis julio

Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF)

Spezokonto - Bilanco - Financa raporto por 1986

(la sumoj estas en belgaj frankoj) (inter krampoj la sumoj de la antaŭa jaro; 1 guldeno = 18,36 frankoj)

Spezokonto por la jaro 1986		Rimendoj	
Kostoj			
Ĝeneralaj kostoj, inkl. deprezoj	2 294 (2 277)	Membrokotizoj	16 989 (10 190)
Kostoj de materialoj	3 825 (2 056)	Donacoj, krompagoj de membroj	9 218 (5 361)
Kostoj de Novaĵleteroj	13 976 (11 108)	Donacoj pro fondkunveno	- (7 289)
Kostoj de afranko k.s.	6 555 (4 645)	Gajno pro peradvendoj (nete)	314 -
Kostoj de informado k.s.	830 (8 207)	Gajno pro reklamantoj kaj kurtaĝoj	7 560 (2 534)
Veturkostoj estraranoj	8 749 -	Ricevita rentumo	323 -
Kostoj fondkunveno	- (9 474)	Enspezoj pro profesiaj servoj	- (2 754)
		Malgajno por la jaro	1 825 (9 639)
	-----		-----
	36 229 (37 767)		36 229 (37 767)

Bilanco je 1986.12.31		Pasivo	
Aktivo			
Starigaj kostoj, nete de deprezoj	789 (2 368)	Kotizoj antaŭpagitaj	8 586 (8 427)
Biblioteko	1 120 (973)	Kapitalo pro dunvivaj membroj	14 189 (6 977)
Poŝtĉekkonto belga	28 751 -	Subtena fondaĵo	92 (734)
Konto ĉe Universala Esperanto As.	367 -	Kreditoroj diversaj	441 (643)
Mondkomerca Eldonejo Esperantista	- (22 987)	Kapitalo	9 544 (19 186)
		- malgajno	-1 825 (-9 639)
		Nete	7 719 (9 547)*
	-----		-----
	31 027 (26 328)		31 027 (26 328)

* diferenco pro transkalkulo de guldenoj al belgaj frankoj

Dum la pasinta jaro IKEF akiris stabilecon. La kostoj pro starigo kaj diskonigo de la fakgrupo malpliigis. La spezokonto montras kontentige malgrandan malgajnon. En la nuna jaro - se la kunlaboro kun HEA estos sukcesa - la kostoj pro Novaĵleteroj malpliigos. Je la enspeza flanko, la membro-nombro kreskas kaj espereble venos ankoraŭ pli da maklerajoj pro reklamantoj.

En septembro pasintjare la librotendado transiris al nova kastisto. La ciferoj nun estas en belgaj frankoj anstataŭ nederlandaj guldenoj. IKEF malfermis du kontojn: unu estas belga poŝtĉek-konto (frankoj), alia estas konto ĉe Universala Esperanto-Asocio en Rotterdam (guldenoj).

Ke preskaŭ la tuta monhavaĵo je bilancdato estas en belga konto estas hazarda situacio. La intenco estas ĝin pli malpli egale dividi inter ambaŭ kontojn, laŭ la bezonoj.

Ekzempleron de jenaj ciferoj ricevis la revizoro, S-ro Polerani.

Roland Rotsaert, Kasisto (87.03.11)

4c. Laŭ Statuto 7.2, unua frazo, nia Estraro povas konsisti el maksimume 7 estraranoj. Aktuale ni havas ses; ni do povas alelekti pluan estraranon. Por tio la estraro proponas s-ron Seik Yamasaki, Japanio (IKEF 43) kiel la sep-an.

5. Nia Statuto, 7.4 kaj 8, montras la procedon pri aprobo de la jarraportoj kaj elekto de estraranoj. Ĉi-jare ni aranĝos oficialan Ĝeneralan Kunvenon por nia membraro kadre de la Universala Kongreso en Varsovio. Diskutado kaj aprobo pri la jarraportoj (vidu punktojn 1-3) kaj elekto de estraranoj vidu punktojn 4a - 4c) okazos tie. Membroj, kiuj ne venos al Varsovio, rajtas skribi komisiu alian membron ĉeestontan pri aprobo kaj voĉdonado.

RAPORTO PRI LA AGADO DE IKEF EN LA JARO 1986

Membraro denove pligrandiĝis

En la jaro 1986 la membraro denove esence pligrandiĝis, nome de 34 membroj komence de la jaro al 52 je la jarfino. Inter ili estas du Dumvivaj Membroj, s-roj Mee (IKEF 2) kaj Voit (IKEF 17). La 52 membroj loĝas en 22 landoj.

Evoluiga agado estas la sistemo de perantoj, al kio donis la estraro grandan atenton. Ni havas nun perantojn en kvin landoj. Ilia tasko estas varbado por IKEF en siaj landoj, kontakti esperantistajn ekonomistojn, kaj ankaŭ enkasigi la kotizon de la samlandaj membroj.

Nia komunikilo, la "Laŭokaza Novaĵletero", aperis sesfoje dum la jaro; ĉiam akurate, escepte de la lasta numero. Ĝi liveris entute 66 paĝojn (kompare al 48 paĝoj en 1985). Ĝia aspekto ne ŝanĝiĝis dum la jaro. Eble ni plibeligos ĝin en 1987.

La lastaj du numeroj estis kopiitaj fare de la Ekonomikista Grupo de la Hungara Esperanto-Asocio (IKEF 24) kaj forsendita de tie. Per tio ni malaltigis la kostojn de la Laŭokaza Novaĵletero, krome niaj membroj en Hungario povas facile pagi siajn membrkotizojn. Tio estas komenco de plilarĝigota kunlaboro kun la hungaraj membroj kaj modelo por kunlaboro kun membroj en landoj kun transpagaj problemoj.

Ŝanĝoj en la Estraro

La Estraro iom ŝanĝiĝis. Post dujara aktiva kaj fervora agado nia Ĝenerala Sekretario kaj Financa Konsilanto, s-ro Lawrence Mee, demisiis en oktobro 1986 de siaj du oficoj pro privataj kaŭzoj kaj emeritiĝo, sed tamen restis estrarano. Lian taskon kiel Financa Konsilanto transprenis nova - de la membraro ankoraŭ aprobenda - estrarano, s-ro Roland Rotsaert, Brugge/Belgio (IKEF 3). La taskon de la Ĝenerala Sekretario transprenis provizore la Prezidanto, s-ro Franz J. Braun (IKEF 4). Li kaj la itala estrarano, d-ro Marco Picasso (IKEF 23), estis novelektitaj per Perpoŝta Referendumo por du jaroj ĝis julio 1988.

Pro la ŝanĝo al kasisto loĝanta en Belgio ŝanĝiĝis ankaŭ la valuto por kotizoj kaj kontotenado el nederlandaj guldenoj en belgajn frankojn. La baza jarkotizo tamen ne plialtiĝis; ĝi estas nun 400 belgaj frankoj. En la pasinta jaro ni establis propran poŝtĉe kkonton en Belgio - n-ro 000-1592629-83 - kaj personan konton ĉe UEA - ikef-c.

Informkunveno dum la 71a UK en Pekino

Dum la jaro 1986 okazis du gravaj kunvenoj, nome ne-oficiala informkunveno en la kadro de la Universala Kongreso en Pekino je la 31a de julio. Ĝin ĉeestis 38 personoj el 14 landoj, inter ili 6 membroj de IKEF. La estraranoj Braun kaj d-ro Gether (IKEF 7) gvidis la kunvenon, donis la deziritajn informojn kaj kolektis opiniojn de la ĉeestantoj. Plia grava kunveno estis la estrarkunsido je la 13a de septembro en Brugge/Belgio, kie estis farataj gravaj decidoj. Ĉefa diskutpunkto tie

estis la terminologia laboro. Ĉe tio ni devas rezigni, pro manko da mono, pri noveladono de plivastigota "Internacia komerca-ekonomika vortaro en 9 lingvoj" (eldonejo Kluwer, 1974). Anstataŭe ni volas traduki esperanten la kvinlingvan "Ŝlosilvortaro terminaron de la Internacia Komerca Ĉambro ("Key words in international trade", ICC Paris) kaj la naŭlingvan vortaron "Ekonomio, Financo, Mono" ("Economie-Finance-Monnaie") de la Eŭropa Komunumo, kaj provi aldoni al ili Esperanton kiel plian lingvon. Pluraj kunagantoj el diverslingvaj landoj estas ankoraŭ serĉataj. Ĉiu ricevos je la kostoj de la fakgrupo kopion de la vortaro kiel laborilon.

Gravaj agadoj

Jen gravaj menciindaj agadoj de estraranoj dum 1986:

D-ro Picasso kunagis ĉe la 46a Internacia Foiro pri Fiskaptado je la 5-8a de junio 1986 en Ancona/Italio. Esperanto estis unu el la oficialaj lingvoj de la foiro. D-ro Picasso ĉe tio ankaŭ sukcesis inviti du afrikajn IKEF-membrojn al senpaga partopreno en la foiro. Li ankaŭ estas la iniciatinto pri la identecŝildo, per kio niaj membroj prezentas en la Laŭokaza Novaĵletero siajn kapablojn, spertojn, rilatojn, specialajn servojn, por pli bona interkonatiĝo.

Grandan eĥon kaj multajn laŭdojn kaj menciojn ricevis s-ro Gilbert (IKEF 14), Bar-le-Duc/Francio. Kiel direktoro de la tiea Komerca Ĉambro li sukcesis aperigi kvarlingvan informbroŝuron pri la industriaj entreprenoj kaj produktoj en sia regiono. "Kio faras kion?" ricevis multe da atento ankaŭ en la ne-esperantista gazetaro.

D-ro Gether, Budapeŝto, faris sukcesan prelegvojaĝon tra FR Germanio. Antaŭ dek lokaj Esperanto-grupoj en diversaj urboj li referis pri la temo "La hungara ekonomio en la 1986a jaro". Per tio li mem kaj la fakgrupo vekis plurajn eĥojn en lokaj ĵurnaloj kaj ankaŭ en la Esperanto-gazetaro.

La ĝisnuna Ĝenerala Sekretario, s-ro Lawrence Mee, dediĉis multajn horojn al korespondado kun, ĉefe membrokandidatoj, kaj al la verkado de la Laŭokaza Novaĵletero. Ankaŭ post sia emeritiĝo li kontribuis kaj kontribuos al la Novaĵletero per siaj "Okazaj informeroj", mallongaj eseoj pri specialaj ekonomiaj temoj.

Plifortigi nian destinitan laborbazon, katedron, tribunon, la revuon MONATO, estis la plej granda zorgo de s-ro Franz J. Braun. Li havigis al MONATO dum la jaro kvar reklamanoncojn de germanaj firmaoj - de kiuj la fakgrupo ricevas 15% da makleraĵo - kaj kontribuis per du fakaj artikoloj al MONATO.

La ĉi-supra nombrado montras la pligrandiĝintan aktivecon de la IKEF-membraro, ĉefe de la estraranoj. Bedaŭrinde mankas ankoraŭ simila aktiveco de aliaj membroj. Sed tio estas nepre necesa por tute vigla agado de nia fakgrupo. Estus ja progreso, se ili almenaŭ reagas al aktivado de iu alia membro; ekzemple partopreni kaj sin prezenti en Foiro pri Fiskaptado en Ancona aŭ alskribi firmaojn en la regiono de Bar-le-Duc aŭ firmaojn reklamantojn en MONATO. Per tio la ne-esperantistaro vidus, ke Esperanto efektive vivas, kaj tio kredeble estas pli grava por la estonta prospero de nia internacia lingvo ol agado direktita al movadinterno.

INTERNACIA KOMERCA KAJ EKONOMIA FAKGRUPO

Pagoj - Perantoj - Kotizo

Ĉiuj landoj

Poŝtĉekkonto belga (Bruselo):
n-ro 000-1592629-83 kaj Konto
ĉe Universala Esperanto-Asocio,
Rotterdam, Nederlando: „ikef-c”
je nomo de: IKEF, p.a. R. Rot-
saert, Visspaanstraat 97, B-8000
Brugge

Perantoj

Britio S-ro P. Foss, Long House
Hotel, Pilton, Som., BA4 4BP

Francio

S-ro F.X. Gilbert, Vert Coteau,
Longeville-en-Barrois, 55000
Bar-le-Duc (CCP 1275-89 L
Nancy)

FR Germanio

S-ro F.J. Braun, Hornisgrindestr.
8, 7580 Bühl 16
(Volksbank Bühl 713104 - BLZ
66291400)

Italio

D-ro M. Picasso, via De Gasperi
7, 20057 Veduggio al Lambro

Jugoslavio

S-ro S. Taleski, ul. 'Oslo' br. 12,
91000 Skopje

Hungario

S-ro Jozsef Horvath, Budapest
(Sekretario de Ekonomikista
Grupo de HEA)

Koreio

S-ro Han Moo-hyup, CPO Kesto
5154, Seoul

Togolando

S-ro Koffi Gbeglo, B.P. 13169.
Nyékonakpoé

Kotizo

400 belgaj frankoj
20 nederlandaj guldenoj

INTERKONATIĜO

A) Novaj Membroj

Ĉi-foje ni povas plezure
bonvenigi kvin novajn membrojn,
inter ili kvar el Suda Koreo.
Supozeble tiu alfluo el orientazia
lando estas efiko de la
informkunveno en la 71a
Universala Kongreso en Pekino.

55 S-ro Horvath, József
p.a. EKOESP
PF 193
H 1368 Budapest, Hungario

56 S-ro Moo-hyup, Han
CPO Kesto 5154
Seoul, Suda Koreo

57 S-ro Won-seop, Nam
403-ho Dongyang B/D
17ho 683, Yoksam-dong
Kangnam-ku 135
Seoul, Suda Koreo

58 S-ro Jong-ĝin, Gim
Sudaemun
PO Kesto 67
120 Seoul, Suda Koreo

59 S-ro Hak-sun, Rhee
706 ho sejong B/D (Gjubin
Silop)
100 Dangju-dong, Jongro-ku
110 Seoul, Suda Koreo

B) Adresoŝanĝoj:

Jen novaj adresoj de membroj:

02 S-ro Mee, Lawrence
19 Cranbury Road
Eastleigh
SO5 5HB. Britio
(ĝis nun Rotterdam, Nederlando)

06 S-ro Rapley, John C.
31 Dakota Avenue
Beachhaven
Auckland 10, Nov-Zelando

21 S-ro Arocha, José Gabriel
Apartado 404 Carmelitas
Caracas 1010 A, Venezuelo

32 S-ro Novakovic, Dragan
Box 99
Verdun Que.
H4G 3E1. Kanado

International Business Dictionary in nine languages

Internacia komerca-ekonomika vortaro
en naŭ lingvoj

Eng
Esperanto
Deutsch
Español
Français
Italiano
Nederlands
Português
Svensk

Planned, compiled and edited by | F. Munnikma
Projektis, kompilis kaj redaktis

Under the auspices of | Instituto por Esperanto en Komerc
Sub aŭspicio de | kaj Industrio (EKI)
The Netherlands - Nederlando

C) Identecŝildoj:

32 Dragan Novakovic
Box 99
Verdun Que.
H4G 3E1 Kanado
Tel. (514) 768-1502
- Estro-Posedanto de malgranda
import- kaj distriubu-firmao
(ONDO) Import & Distributing,
Inc., sama adreso kiel supre;
- Laŭ profesio: detala
komercisto vendisto;
- Lingvaj eblecoj: serbokroata,
angla kaj franca;
- Kompetenco: memstara
entreprenisto en komerc kaj
ŝtala konstruado kun tre bona
kono de orient-kanada kaj
nordorint-usona merkato;
- Importaj deziroj/eblecoj:
produktoj el latuno kaj kupro
por ĝenerala uzo, ekz.: lustroj,
kandelingoj, spegulkadroj,
ornamaĵoj por pordoj kaj
banĉambroj. Plie tre interesata
pri novaj produktoj por domo aŭ
persona uzo, kiuj ne bezonas
elektron;
- Eksportaj eblecoj: senlima!
Skribu, petu! Povos helpi trovi
kompetentan fabrikanton kaj
negoci plej bonan prezon kaj
kondiĉojn;
- Rilatoj: Kun metalindustrio kaj
komercaj entreprenoj en la sama
fako.

Pri reklamanoncoj en MONATO

Unuafoje aperis en MONATO n-ro 1/87 reklamanonco de japana firmao, MITSUI, kiun varbis nia membro Seikô Yamasaki. Gratulon pro tio! Li disponigos la 15 % da makleraĵo ricevota de MONATO pri ĉiu anonco al la IKEF-kaso.

S-ro Yamasaki skribis jenan leteron al nia prezidanto:

Sinjoro Franz J. Braun

185 Tôkyo, Kokubunzi
Higasi Koigakubo 3-18-12
Japanujo

1987 01 31

Estimata sinjoro,

Nun ke la reklamo de Mitsui aperis en MONATO, estas via vico agi. Mi petas vin:

1. atentigi la IKEFanoj pri ĝi per la Novaĵletero aŭ aliaj rim-
edoj, petante ilin agi en la jena maniero:

- a) skribi al Mitsui ke ili legis la reklamon en MONATO kaj interesiĝis pri Mitsui kaj peti broŝuron aŭ aliajn materialojn pri tiu;
- b) Mitsui sendos al ili petatajn materialojn, kaj tiam ree skribi al Mitsui ke estas bedaŭrinde ke ĝi ne havas materialojn en Esperanto kaj ke ĝi devas pretigi tiajn se ĝi volas esti inda je la nomo de internacia kompanio;
- c) skribi aŭ telefoni al la oficejo de Mitsui en la urbo kie loĝas tiu IKEFano (adreso troviĝas en la broŝuro), gratulante la MONATO-reklamon, konatiĝi kun la estro kaj stabanoj de Mitsui kaj espereble aranĝi kun ili okazaĵojn de amikeco inter la koncernata urbo aŭ lando kaj Japanio kun Esperanto kiel apudtemo (japanaj aferistoj loĝantaj eksterlande estas nun tre sentemaj pri sekurigo de simpatio al Japanio en la koncernata lando konsidere de la komercaj konfliktoj rezultintaj el la granda aktiva saldo en la internacia bilanco de Japanio).

Sincere via,

Yamasaki-Seikô
YAMASAKI Seikô

Li vere pravas per tia opinio. La prezidanto tuj kantis la okazon kaj skribis la apudan leteron al la germana ĉefsidejo de MITSUI en Düsseldorf, esperantlingve kun aldonita traduko en germanan lingvon. Faru vi la saman!

Franz J. Braun

Hornisgrindstraße 8
D 7580 Bühl 16 (Balzhofen), den 7 feb 1987
Telefon 072 23/2 4473

Mitsui & Co Europe GmbH
Königsallee 92a

D 4000 Düsseldorf

Via anonco en la Esperanto-magazino MONATO n-ro 1/87

Estimataj gesinjoroj,

En la revuo MONATO mi ekvidis vian imponan anoncon pri via kompanio. Mi ĝojas, ke ankaŭ vi ekkonas la utilon de la internacia lingvo Esperanto kaj verbas en ĝi, same kiel faras aliaj entreprenoj.

Mi estas estro de la aĉetsekcio en la uzino Bühlertal de la germana kompanio Robert Bosch GmbH (vidu la aldonitan vizitkarton). Kiel aĉetisto mi ĉiam serĉas kontakton kun bonaj liverantoj. En mia uzino ni ĉefe fabrikas malaltensiajn elektromotorojn por aŭtomobiloj (ekzemple por viŝiloj, fenestro-leviloj, bloviloj). Se via kompanio povas liveri ion por tio al ni, bonvolu kontakti min.

Atendante vian respondon, mi afable salutas vin.

Sincere via

Franz J. Braun

Fall Sie Esperanto nicht verstehen, dasselbe in Deutsch:

Ihre Anzeige im Esperanto-Magazin MONATO Nr. 1/87

Sehr geehrte Herren,

In der Zeitschrift MONATO sah ich die beeindruckende Anzeige über Ihre Firma. Ich freue mich, daß auch Sie den Nutzen der internationalen Sprache Esperanto erkennen und in ihr werben, ebenso wie andere Firmen es machen.

Ich bin Einkaufsleiter im Werk Bühlertal der deutschen Firma Robert Bosch GmbH (siehe Visitenkarte). Als Einkäufer suche ich immer Kontakt mit guten Lieferanten. In unserem Werk Bühlertal/Bühl stellen wir hauptsächlich Niederspannungs-Elektromotoren für Autos her (z.B. für Scheibenwischer, Fensterheber, Gebläse). Falls Ihre Firma uns dafür etwas liefern kann, bitte ich Sie um Kontaktaufnahme.

Auf Ihre Antwort freue ich mich.

Mit freundlichen Grüßen

La "Terminologia Ludo"

Je la alvoko en LN 15 sur paĝoj 4-6 al "kunludo" en terminologia laboro mi ricevis nur du reagojn, nome de s-roj Rotsaert, Brugge/Belgio kaj Wiersch, Welzheim/FR Germanio (IKEF 19). Do la ludo komenciĝis iom malvigla.

Jen iliaj ŝanĝproponoj pri la esperantaj nocioj (vidu LN 15, paĝo 6!):

n-ro	Esperanta nocio laŭ propono de Braun	ŝanĝproponoj de	
		Rotsaert	Wiersch
60a	nuligplendo	-	apelacio pri nuligo
64	suplementa aldonaĵo	aneksa klaŭzo (polisa) anekso	aldono
65	adresato	-	adresato, ricevonto
67a	responskonfeso	respondeckonfeso	-
69	parta antaŭpago	antaŭpago	-
70c	varbokampanjo	reklamkampanjo	-
70d	slogano	-	reklama argumento
70f	malsukcesa varbado	malsukcesa reklamo	-


Do pri la plimulto de la 22 nocioj s-roj Rotsaert kaj Wiersch konsentis kun la iniciatinto.

Skribu ankaŭ Vi vian opinion!

Ni volas estonte prezenti en ĉiu LN paĝon el la ICC-vortaro samamane kiel en LN 15, paĝo 6, por via "kunludo".

Cetere, s-ro Wiersch jam komencis traduki la ICC vortaron.

Se vi volas ne nur "kunludi", sed kunlabori, bonvolu anonci vin al li. Ĉiu kunlaboranto ricevos senpage kopion de la ICC-vortaro kiel laborilon.



LINGVO: Esperanto

Jarabono: US\$10--
(\$6 en N. Amer.)

Abonadreso:
INTERFAKTO
P.O. Box 42205
Washington, D. C. 20015

Foiro pri Fiŝkaptado ankaŭ en 1987

D-ro Picasso atentigas nin, ke ankaŭ en ĉi tiu jaro okazos la Foiro pri Fiŝkaptado en Ancona/Italio, de la 1a ĝis 5a de junio. Unu el la oficialaj lingvoj estos Esperanto.

Ĉe tio IKEF-membroj estos gastigataj de la foiro (senpaga restado) dum du tagoj. Interesatoj bovolu anonci sin al s-ro Ferretti c/o Fiera di Ancona, 71100 Ancona, Italio, aŭ en kazo de problemo al d-ro Marco Picasso, Via de Gasperi, 7, I-20057 Vedano al Lambro.

Kial vi ankoraŭ hezitas? Ek al Ancona! Ĝuu tie la sunan veteron, la bluan maron, la travivaĵojn de foiro, la agrablan (parte senkoston) Esperanto-etoson kaj helpu al d-ro Picasso, ke lia agado fariĝu sukceso por li, por IKEF kaj por Esperanto.

Cetere, en Ancona okazos ne-oficiala kunsido inter la ĉeestantaj IKEF-anoj.

Prelegvojaĝo en Britujo

En februaro de 1987 mi prelegvojaĝis en la suda parto de Britujo. Dum la rondveturo mi vizitis kelkajn E-grupojn, -klubojn kaj korespondamikojn. La programo de mia vojaĝo komenciĝis en la kunveno de la E-grupo en Folkstone. La grupanoj fiere montris la foton faritan okaze de la vizito de Zamenhof. Poste mi prelegis en la fama Londona Esperanto-Klubo pri la nuntempa ekonomidirektada sistemo hungara. Ĉeestis ĉ. 40 gesamideanoj kaj ili tre intense interesiĝis pri la temo.

Dufoje mi prelegis angle pri la hungara ekonomio kaj la reformoj. Unue en Wye en la agrikultura altlernejo kaj en Reading en la universitato. Ankaŭ la profesoroj tre ĝojis pri tio, ke ili havis okazon demandi fakulon pri la tn. planekonomioj. Ankaŭ la gestudentoj demandis multe post la prelegoj. En Chippenham mi vizitis mezlernejon, kie en la ekonomia studhorro mi parolis Esperante pri la ĝeneralaj trajtoj de la planekonomioj kaj s-ro Johns tradukis la prelegon anglan. En la sama urbo mi renkontiĝis kun la urba E-grupo. La konversacio estis tre entuziasmiga, multaj novaj gesamideanoj ĉeestis. Mi vizitis la landan peranton de IKEF, s-ron Paul Foss, kiu havas ĉarman, tre familian hotelon

en Pilton. La vilaĝo troviĝas en belega regiono riĉa je monumentoj, ekz. tiuj de Bath, Wells, Bristol. Li gastigis min kaj mi povis interkonatiĝi ne nur kun la ĉirkaŭaĵo, sed ankaŭ kun la tieaj movadaj eblecoj kaj liaj spertoj.

Survoje tien kaj reen mi vizitis s-ron R. Rotsaert, la kasisiton de IKEF en Bruĝo. Li gastigis min kaj montris la ĉirkaŭaĵon. Li organizis esperantistan kompanion por vojaĝi per trajno inter Bruĝo kaj Bruselo. La renkontiĝo kun s-ro Rotsaert estis ĝojo por mi kaj ankaŭ tre utila, ĉar mi eksciis multe pri la lokaj movadaj aferoj, kaj ni multe parolis pri la fakgrupaj aferoj.

Ankaŭ tie ĉi mi ŝatus danki la afablecon de miaj gastigintoj pro la gastigo kaj la neforgeseblaj travivaĵoj.

D-ro GETHER István

FIŜKAPTADO EN TOGOLANDO de Gbeglo Koffi

Fiŝkaptado utilas al ĉiuj landoj, do ankaŭ al Togolando, ĉar fiŝoj konsistigas gravan rezervon da proteinoj, kiujn homo bezonas por sia kreskado kaj bonfarto. Kiel en ceteraj landoj, fiŝkaptado en Togolando estas duaspecta: surmara fiŝkaptado kaj surtera fiŝkaptado.

I. Surmara fiŝkaptado

Praktikata delonge fare de praloĝantoj kaj nuntempuloj, la fiŝkaptado konsistigas en la ekonomio de Togolando gravan faktoron pri la nutrado pro liverado de altvalitaj proteinoj. Malgraŭ klopodoj por sia plibonigo, ĝi liveras ĉiujare nur 10 ĝis 12.000 t da fiŝoj. STAL-Pêche (Société togolaise arabe-Libienne de pêche - Societo togolanda arab-libia por fiŝkaptado) okupiĝas pri ĉi tiu fiŝkaptado, dum aliaj societoj, nome ONP (Office National de Pêche - Ŝtata Servo por Fiŝkaptado) kreita en 1972, kaj SOTOPROMER (Société togolaise des produits de mer - Societo togolanda por fiŝkaptaĵoj maraj) kreita en 1978 fiaskis pro manko de monrimedoj. Ĉi tiu mara fiŝkaptado duapartiĝis:

Metiista fiŝkaptado - Industria fiŝkaptado

la) Metiista Fiŝkaptado

Laŭ la popolnombrado en Junio 1980, oni kalkulis 2289 fiŝkaptistojn el kiuj 1464 estis gananoj (el Gano, apuda lando). La fiŝkaptiloj estas arkaikaj: pirogoj (simplaj kaj motorigitaj), trenretoj (sejnoj), maŝretoj, turnretoj, foldretoj kaj diversaj fiŝfadenoj.

lb) Industra fiŝkaptado

La sola fiŝindustrio estas STAL-Pêche. Ĝi disponas pri nur unu trolŝipo longa je 30 m, kaj kies potenco estas 850 ĉp.¹⁾ Tamen sejnŝipoj el Gano vizitadas fiŝhavenon de Lomé (ĉefurbo de Togolando). Al iuj estas permesite fiŝkapti en togolanda marparto, dum aliaj nur albordigas siajn kaptaĵojn.

En 1981 la floteto (ŝipareto), kiu vizitadis fiŝhavenon de Lomé, konsistis el tri trolŝipoj kaj 13 sejnŝipoj. Hispanaj societoj pri fiŝkaptado, kiuj havas siajn fiŝkaptajn regionojn multe pli en la sudo albordigas en la havenon de Lomé por vendi siajn plurajn kaptaĵojn.

II. Surtera fiŝkaptado

Temas pri fiŝkaptado en lagoj, lagunoj, fluoj ktp. kaj fiŝbredado (fiŝkulturo). La fiŝbredado estis enkondukita en Togolando en la jaro 1954. Ĝi okazas en vastaj basenoj fositaj dis en la lando, nome en Na (Sokode)², Kpewa (Bafilo)², Kpodzi (Kpalimé)², Talo Agbofon (Atakpame)². Fiŝkaptadon en lagunoj, lagoj, fluoj ktp praktikas la popolan kiel helpantan laboron, ĉar la ĉefa laboro estas agrikulturo.

II Produktado kaj komercado de fiŝoj

La fiŝoj liverataj de togolanda fiŝkaptado ne kontentigas togolandanojn, t.e. la kvanto estas ege malalta rilate al la bezono. Pri la komercado de la fiŝo okupiĝas virinoj, kiuj praktikas la konservadon per sekigado, peklado kaj fritado. La komerco estas nur enlanda pro la nesufiĉeco de la fiŝkaptaĵoj. Por provizi la tutan popolon per fiŝoj, Togolando devas importi fiŝojn. Jen la realaj nombroj de la jaro 1984:

Metiista fiŝkaptado 10.151 tunoj

Industria fiŝkaptado 183 "

Importaĵo 9.000 "

Sumo (enlanda bezono) 19.334 tunoj.

En tri jaroj antaŭe la industria fiŝkaptado kaj la importaĵo estis iom pli altaj ol en 1984.

Konkludo

Ĝenerale, fiŝkaptado en Togolando ankoraŭ ne estas evoluinta. Tial la ŝtato, ĉiam zorgema pro la feliĉo de sia enloĝantaro, klopodas kreskigi fiŝkaptadon kaj sekve disponigi multe da fiŝoj ĉiuspecaj. La ĉefaj klopodoj estas:

- konstruo de fortikaj pirogoj,
- plibonigado de la ŝipkelo (holdo),
- disvolvigo de novaj fiŝkaptiloj,
- aĉeto de malgrandaj boatoj por trolŝipado kaj sejnŝipado,
- konsento kun najbaraj landoj pri fiŝkaptado.

Ĝenerala rimarko

Mankas ĉiam fiŝoj por la nutrado de togolandanaj buŝoj, ĉar fiŝkaptaĵoj el la lando mem estas multe nesufiĉaj. Por kontentigi tiun bezonon pri fiŝo, Togolando plifortigu la importadon. Tial multaj societoj kreiĝas por importi el neafrikaj landoj frostigitajn fiŝojn.

1) ĉp = ĉevalpovo

2) togolandaj urboj

Okazaj informeroj.

Historieto anstataŭ pli serioza esploro.

Kiu lastatempe ion aŭdis pri la Esperanto-Asocio de Dolzvelania, tiu ĉarma regiono proksime al la kuniĝo de la landoj Bulgario, Jugoslavio kaj Rumanio? (Eble vi pli facile rekonas la nomon se ni skribus ĝin simile kiel la tiamaj membroj tion faris: Dolĉvaleja Esperanto-Asocio?)

Vi ankoraŭ ne rekonas ĝin? Nu! tio ne mirigu nin; ĝi ĉesis funkcii antaŭ multaj jaroj.

Sed en la tempo de sia florado, tiu asocio multon faris. La asocio posedis propran presejon, kaj la kvaronjara revuo, la Dolĉa Rivereto, akiris tian remonon, ke ĝi komencis aperi ses-foje en la jaro, kun abonantaro nombrita en kelkaj centoj tra multaj landoj. Monsubvencioj de la asocio donis gravan helpon al kelkaj bonaj, fondusoj neniel ligitaj kun la asocio mem, kaj la E.-Movado de tiu tempo agnoskis kun laŭdo tiun helpan manon. La membroj de la asocio, tamen, ne gajnis renomon ekster sia propra regiono, ĉar neniel pretendis al gvidrolo en la Movado, sed trovis kontenton labori tute loke, krom pri la revuo.

Ho ve! baldaŭ post la ŝanĝo al ses-foje-jara apero, la revuo ĉesis aperi: ĝi estas nun forgesita krom de kelkaj bibliotekistoj de la antaŭa epoko, kaj de la verkistoj kiuj debutis en la paĝoj de ĝi.

Kio tiel ŝanĝis la situacion?

La ĉefa kaŭzo estis, ke la malnova presmaŝino subite ĉesis funkcii, (eble pro la troa ŝarĝo presi la revuon pli ofte ol antaŭe?), kaj nenia mono troviĝis en la kaso, aŭ por aĉeti novan maŝinon aŭ riparigi la jaman.

Tiu manko de mono en la kaso ne estis nova fenomeno, ĉar ĉiam, kiam mono disponeblis, iu bona iniciato ie en la E.-Movado meritis helpon, kaj ĝin ricevis.

Ĉi-foje, tamen, neniu mecenato tuj venis al Dolzvelania proponante donacon.

La kaŝita kialo estis, ke la asocio ne rekonis la neceson teni sisteme ian formon de kontotenado. La Kasisto supozis, ke se je la fino de la jaro, iu monsumo troviĝas en la kaskesto, tiu mono estas disponebla. La asocio ne estas profitgajna entrepreno, oni argumentis, kaj do kial necesas teni monon publikigi ciferojn?

Nu! la sinteno estas sufiĉe bone konata inter E.-societoj, kaj ni ne povas ne simpatii kun ĝi. Precipe la sinteno, malagnoski la profitmotivon por societo de samidealanoj, estas nur laŭdinda. Sed samtempe ni devas agnoski, ke sistemo de kontotenado havas alain valoron, tiu de konservado de la havaĵoj de la societo tiel, ke katastrofo kiel la tuta foruziĝo de ekipaĵoj ne estas tiel katastrofa, ke la societo malaperus.

Niaj nunaj pensoj traktas kontotenadon, neniel kun la intenco montri metodojn sperti profitojn, sed kun la intenco vekii atenton al la nemalhavebla valoro de sistemo, kiu povas grave helpi al plifortigo de niaj komunaj streboj antaŭenigi la ideon komunan al ni: pli vasta akcepto de Esperanto por ke ĝi estu la dua lingvo por la tuta homaro.

La Dolĉvaleja Esperanto-Asocio estas fikcia elpensajo de la verkanto; tion vi jam konstatis. Sed ĉu la priskribita historieto ne tinklas sonorileton por vi? Kiom da bonaj societoj iam floris sed poste malaperis? Ĉu la kialo povas esti manko de sistema kontotenado?

La individuaj membroj de nia Fakgrupo estas ĉiuj spertuloj en iu branĉo de ekonomia aktivado, kaj do ili ĝisfunde konas la interligitecon de sistema kontotenado kun spertado de sukceso en la vendoplaco. Nia Fakgrupo estas unike ekipite, do por okupi gvidrolon en la E.-Movado, kiam tiu Movado vekigis al la neceso ĉasi sukceson en komerca senco, se ĝi volas serioze kapti la atenton de la ekstera mondo, por la genie elpensita varo kiu estas la internacia lingvo.

IKEF devas unue kapti la atenton de la E.-Movado. La vojo al tio estas per modela traktado en ĉiuj niaj aferoj. Nia kontotenado estas jam modele bona; ni forte atentu pri atingo de egale modela konduto je ĉiu flanko de nia fakgrupa vivo.

Im

Letero al la Redaktoro.

Mi volas esprimi mian subtenon por grava punkto en la letero S-ro Yamasaki, (LN-15; paĝo 4), rilate al terminologia laboro ene de la Fakgrupo. Senrigarde pri kiu ekzistanta terminaro estos la bazo por nia laboro, sana al-iro al la tasko devigas nin atenti pri praktika organizado de la laboro. S-ro Y. mencias la neceson por centra adreso al kiu prezentis proponojn, sed vere dirite, la bezono estas persono ĉe tiu adreso. Komenci 'kunlaborado'-n antaŭ ol ni sukcesis vereorganizi niaj laborfortojn, estas la plej rekta vojo al masiva malkoncentrigo de niaj energioj.

Jam plurfoje en LN-o, ni aludis al tiu bezono, kaj specife menciis ak bezonon de kunordiganto por terminologia laboro; ankora- ni atendas sinproponon por la 'posteno'. Entute, ŝajne, ni atendas reagojn de pluraj Membroj al la pluraj alvokoj de la Estraro, kaj por kunlaborantoj kaj por organizi la laboron, se ni ne havas monon de la disponeblaj fortoj. La plej grava manko estas tiu de kunordiganto por la laboro.

Lorenc' Mi.

Ekonomia faktermino: likidajo

Facile disponebla monhavaĵo (kontanto, kuranta poŝtĉek- aŭ bank-konto, disponebla kredito ĉe UEA kaj simile).
Neologismo proponita 1978 flanke de d-ro Roelofs, NL)

REDAKTOFINO

Limdato por alskribi por LN 17:1987-05-16

Reklamtarifoj:

- a) por Membroj de IKEF:
unu anonceto ĝis inkluzive
ses linioj: senpage;
por pli longaj anoncetoj:
po 1 respondkupono, (irpk),
por ĉiuj komenciĝantaj ses
linioj de 27 literospacoj.
Ĉiam: unuope mendendaj.
- b) por ne-Membroj de IKEF:
po 1 irpk por ĉiu linio, aŭ
por ĉiuj tri milimetroj de
longeco, enkadrigita,
sed kun minimumo de ok
irpk-oj. Ĉiam antaŭpagita.
Por anoncoj je pli granda
larĝeco ol unu kolumno:
laŭ aparta interkonsento.
Ĉiam: tri aperoj de la sama
anonco en sinsekvaj kajeroj
por la prezo de du aperoj.

Kurzo: 1 irpk = 1,00 gld.

FOKUSO

En la antaŭa numero
de *Laŭokaza*
Novajletero vi jam
povis legi pri lanova
periodaĵo **FOKUSO**,
kaj pri tio, ke tiun
revuon prizorgas
grandparte la
hungaraj anoj de
IKEF. Estis menciita
ankaŭ tio, ke
FOKUSO helpas al
IKEF per publikigo
de informoj pri ĝia
agado kaj per
aperigo de informoj
pri ĝia agado kaj per
aperigo de artikoloj
pri ekonomiaj temoj.

Do, se vi havas
interesan artikolon
(ĉu originale
Esperant-lingvan, ĉu
tradukitan), taŭgan
por publikigo en
FOKUSO, ne hezitu
sendi ĝin al:
Ekonomikista Grupo
de Hungara
Esperanto-Asocio
Budapest, Pf. H-1368
Se vi ankoraŭ ne
vidis **FOKUSO**-n,
petu senpagan
provekzempleron
ĉela sama adreso.

fortranĉi

Internacia Komerca kaj
Ekonomia Fakgrupo /IKEF/
Financa sidejo: Visspaan-
straat 97, B 8000
Brugge, Belgio
A L I G I L O

Per tio ĉi mi/ni petas ali-
ĝon al la Internacia Komerca
kaj Ekonomia Fakgrupo
/IKEF/, kiel individua per-
sono/entrepreno/ alia ins-
tanco. Mi/Ni deklaras la in-
tencon subteni la statuton
de IKEF kaj finance kontri-
bui al la mastrumado de la
Fakgrupo.

Nomo, sub kiu la membreco elastiĝu.....
Plena poŝtadreso.....
S-ino/F-ino/S-rojaro de naskiĝo/fondiĝo/.....
.....
Profesia okupo kaj agadkampo/j/.....
Maniero de kotizpago
Loko/DatoSubskribo.....